

# LA PROGRESO

Bohema organo esperantista  Ĉasopis českých esperantistů

Aperas monate. Jara abono K 4.50 (por 10 numeroj). — Redakcio Plzeň, Račyňská ul. 10. Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — La manuskriptojn oni ne resendas.

## Al niaj mortintoj!

*Kun granda doloro en la koro ni memoras Vin, Vi karaj amikoj niaj, al kiuj la Sorto ordonis forlasi dum la terura milito niajn vicojn. Vi foriris por ĉiam, nevidante la venkon de la ideo, kiun Vi propagandis. Ni levas la standardon post kiu Vi iam paŝis, kun scio, ke ni vivas kaj ke ni certe venos tien, kien ankaŭ Vi celis. Ne ĉiu el ni povas fari agagojn senmortajn, ne ĉiu povas esti poeto aŭ verkisto, sed ni scias, ke ĉiu el ni povas kaj eĉ devas honeste labori en sia fako por akceli la venkon de unu ĉefa parto de la homaranismo: Universala enkonduko de helpa lingvo internacia. Adiaŭ, karaj amikoj, per nia laboro ni estimos Vin!*

## NACIO KAJ NACIECO.

*Gustav Haberman, regna deputito.*

Simile kiel en la koro kaj animo de ĉiu individuo estas enradikita celado al libera, ordigita, per bonŝtato kaj kontenteco garantiita vivo, ankaŭ la nacioj sopiras je liberigo kaj sendependeco.

Estas ja rajto, eĉ sankta devo de ĉiu nacio, postuli absolutan liberecon, nacie politikan, ekonomian, kulturan kaj ŝtatan aŭtonomion kaj sendependecon, por atingi senperan direktadon de sia sorto kun prizorgo de ĉiuj siaj bezonoj. Kiam ne estas eble akiri absolutan politikan aŭtonomion kaj sendependecon, estas necese krei tiun organizaĵon nacie politikan, kiu ebligas kreon de tute memstaraj kaj sendependaj, politikaj aŭ naciaj ŝtataj tutaj en ligo kun aliaj nacioj. Tiuokaze, por ne limigi la volon de la nacioj, devas la nacie politikaj tutaj mem, sendepende, sen premo kaj devigo, difini por si la kondiĉojn de komuna kunvivo, ebliganta al ĉiuj liberan, sendependan evoluon kaj vivon neniel katenitan per la komuna devo. En la nuna tempo ni estas atestantoj de tiaspeca solvado ĉe la rusaj naciaj organizaĵoj, kie la loka demokracio donis al ĉiu ĉi peno belan esprimon en la nomo: *nacia memdifino*.

## NÁROD A NÁRODNOST.

*Gustav Haberman, říšský poslanec.*

Jako v srdci a duši každého jednotlivce vžitá jest snaha po svobodném, uspořádaném, zajištěném blahem a spokojenosti životu, i národové touží po svobodě a neodvislosti.

Jestif každého národa právem, ba svatou povinností, domáhati se naprosté svobody, národně politické, hospodářské, kulturní a státní samostatnosti a neodvislosti, k umožnění samostatného řízení svých osudů a se zaopatřením všech svých potřeb. V případech, kde není možným dosíci naprosté politické samostatnosti a neodvislosti, jest nejvíce žádoucnou dosažení takové organisace národně politické, jež umožňuje ustavení úplně samostatných a neodvislých, politických aneb národních státních celků ve svazku s jinými národy. V tomto případě, nemá-li vůle národů být omezena, musí takové národně politické celky samy, neodvisle, bez nátlaku a přinucení, ustanoviti si podmínky společného soužití, umožňující všem svobodný, neodvislý vývoj a život, v ničem nespoutaný společnými závazky. V současné době jsme svědky takového řešení organisace národů v Rusku, kde tamní demokracie dala této snaze krásný výraz pojmenováním: *sebeurčení národů*.

Ankaŭ la bohema nacio plenrajte postulas politikan aŭtonomion kaj sendependon, kiun ĝi iam havis, kaj en kies uzado ĝi faris ŝatindajn servojn al si mem, eĉ al la tuta homaro en la celado al klareco, nobleco, eĉ universala progreso.

Nuntempe ni estas atestantoj de granda historia evoluo, kies tasko estas konstrui novan nacian organizaĵon, garantiantan al ĉiuj nacioj, grandaj eĉ malgrandaj, la politikan memstaron kaj sendependon en la menciita direkto.

Sed estas necese ĉiugrade memori la rilatojn de la nacia kaj nacieca vivo. Apud la kompaktaĵoj naciaj tutaj vivas sporadaj partumoj, naciaj elementoj, troviĝantaj sur la vojo de nacia evoluo. Por ĉiuj similaj okazoj — inter kiujn oni neniel povas vicigi la boheman nacion, esceptante ĝiajn partumojn, kiuj vivas en aliaj ŝtatoj kaj landoj — estas necese per internacia leĝo garantii protektraĵon al ĉiu individuo, nacia minorito kaj al la nacie vivanta en la kondiĉoj kaj cirkonstancoj, kiuj ne donis al ili ankoraŭ la memstaran ŝtatan organizaĵon, garantiantan al ili politike nacian vivadon.

Same kiel la diokredo, eklezia kaj religia membreco estas en ĉiu lando kaj moderna ŝtato leĝe protektataj, — kaj malŝatigo estas severe punata, — estas necese zorgi pri la leĝa protekto de la nacieca rajto. Garantii kaj protekti ĉiun por libera aliĝo al kiuj ajn nacio kaj nacieco, por eduko en elementa ĝis plej alta edukinstituto, por akiri rangoj kaj oficiraĵon en administrado de ĉiuj organizaĵoj publikaj, aŭtonomiaj kaj ŝtataj.

Problemo pri nacia organizado kaj nacieca protekto, solvita per la priskribita maniero, helpos al nacia proksimiĝo, forigos la kaŭzojn de konfliktoj kaj kvereloj, ebligos honestan kunvivon de la nacioj kaj homoj, kaj puŝos la homaron forte antaŭen sur la vojo de la progreso kaj atingo de la plej supera feliĉo, libereco kaj kontenteco.

La esperoj vekigitaj en tiu ĉi senco kaj en la nuna tempo speciale forte esprimataj de ĉiuj nacioj, estos, devas esti plenumitaj. Ĉar epokon la plej proksiman atendas solvado de gravaj problemoj socialaj, kaj ne nur socialaj, sed eĉ socialistaj en senco de transformo de societa bazo, liveronta al ĉiu la parton de la laborprofito. La solvo de la organiza problemo nacia kaj de la problemo nacieca, estas gravega kondiĉo por ebligi socialistan transformon.

Také národ český domáhá se plným právem politické samostatnosti a neodvislosti, již se dříve těšival a v jejíž požívání neocenitelné služby sobě a celému lidstvu ve směru vzdělání, osvícenosti a všeobecného pokroku prokázal.

V současné době jsme svědky velikého dějinného vývoje, jehož úkolem jest vybudovati novou organizaci národů, zajišťující všem národům, velikým i malým, politickou samostatnost a neodvislost ve výše naznačeném směru.

Jest však zapotřebi pamatovati na všechny stupně a poměry života národů a národností. Žijit vedle kompaktních národních celků roztroušené zlomky, prvky národností, na cestě vývoje národů se nalézající. Pro všechny tyto případy — do nichž nelze v žádném případě možno řadit národ český, vyjímaje jeho zlomky žijící v jiných a vzdálených zemích a státech — jest třeba mezinárodním zákonem zajistiti všem jedincům, národnostním menšinám a národnostem žijícím v poměrech a okolnostech, jež jim neposkytly ještě samostatnou státní organizaci, zajišťující jim politicky národní žití, *právo ochrany*.

Tak jako víra v behu, příslušnost k církví a náboženství chráněna jest ve všech zemích a moderních státech zákonem — a zlehčování se přísně trestá — jest třeba postarati se o zákonitou ochranu práva na národnost. Zabezpečiti a ochrániti každého přihlásit se k národnosti a národu, ve směru výchovy ve škole obecné až po nejvyšší učiliště, k nabytí práv na hodnosti a úřady ve správě všech organizačních veřejných, samosprávných a státních.

Otázka organizace národní a ochrany národností, výše označeným způsobem luštěna, přiblíží národy navzájem, odstraní příčiny sporů a hádek, a umožní důstojné soužití mezi národy a lidmi, a posune lidstvo o značný krok ku předu, na cestě k pokroku a dosažení nejvyšše možného stupně štěstí, svobody a spokojenosti.

Naděje v tomto smyslu probuzené a přihlásivší se v současné době zvláště silně u všech národů, budou, musí býti splněny. Neboť dobu nejbliže příští očekává řešení velikých otázek sociálních, a nejen sociálních, socialistických ve smyslu přetvoření společenské základny, poskytující všem podíl na zisku práce. Rozluštění otázky organizace národů a otázky národnostní, jest důležitým předpokladem k umožnění přeměn útvarů socialistických.

## SUR LA NOVA VOJO!

Post pli ol trijara silento, reganta en bohema vivo esperantista, aperas nia gazeto por kunigi kaj organizi la fortojn, kiuj estas kapablaj konduki nian movadon al la nova vojo.

La epoko, en kiu ni vivas, estas historie la plej grava, ĉu pro renversado de la malnova ordo, ĉu pro siaj ne ankoraŭ videblaj konsekvencoj. En bruo de la kanonoj, kiam la miloj da plej sanaj homkorpoj verŝas sian sangon sur la batalkampo, naskiĝas la periodo de demokratismo kaj homaro. Nia longa silento instruis nin pripensi. Ni ja povis bone konsideri, kio estis en nia movado malutila kaj nenatura kaj nun ni sentime devas entrepreni radikalajn ŝanĝojn. La disharmonio kaj malpaco, kiuj antaŭ la milito sufokis nian boheman esperantistan vivon, neniam plu devas reveni en niajn vicojn! La vergoj de bohema princo Svatopluk devas esti nia simbolo, kiun ni ĉiuj devas estimi por neforgesigi la bedaŭrindan staton, en kiu sin trovis bohema esperantismo antaŭ la milito. Antaŭ ol ni komencos nian pluan laboron, ni devas akcepti la plej esencan leĝon: submetiĝi al la unueca disciplino. Ĝojiga fakto estas, ke la konferenco de bohemaj esperantistoj, pri kiu ni aliloke raportas, akceptis ĉi tiun principon kaj ni ne dubas, ke la dua konferenco, kiu traktos pri tiu ĉi temo, solvos la gravan punkton al la plena kontenteco de ĉiuj bohemaj esperantistoj.

Nia plej proksima celo devas esti kreo de l' unueca centra organizajo, sur moderna, liberala kaj demokrata bazo, kiu koncentrigos tutan boheman esperantistaron, ne ri-

### BEZONO DE LA MONDLINGVO.

(Salutvortoj de Karlo Pelant al nia gazeto.)

La multaj rilatoj, kiujn kaŭzis la milito per la intermikso de la nacioj klare montris, ke urĝa estas unu komuna helpa lingvo por la tutmonda kompreniĝo, same kiel la plej zorgema kulturado de la lingvoj naciaj. Grava ega faciligo komencos post ĝia ellerno, ĉio perfektigigos multe pli rapide kaj la rilatoj inter la nacioj estos multe pli humanaj. Ĝis la homaro tion komprenos, same kiel ĝi nun konas horloĝon eĉ geografian karton — aŭ parolas nun pri la mortigaj armiloj — tiam oni traktos la helpan lingvon internacian, kiel la plej esenca bezono de ĉiu kultura homo, kiu volas rilatiĝi kun membro de alia nacio.

gardante al kiu societa klaso ĝi apartenas. Kaj kontraŭe, la nove fondita organizajo devas esti tute senpartia, havante unusolan celon: akceli esperantistan movadon en ĉiuj klasoj de nia nacio.

Ni ne dubas, ke la menciita konferenco alportos al ni la deziratan unuecon, kaj ni deziras, ke ĝia verdikto estu konsiderata de ĉiu bohema esperantistokiel nerefutebla leĝo.

Nia gazeto mem volas esti libera tribunalo por propagando kaj uzado de Zamenhova Esperanto, kies intereso sole estos por ni direktedona. La nomo, kiun akceptis nia gazeto, estu la blazono de nia forto kaj laboro, kiu klare scias, kien ĝi celas. Eble la sorto alportos al ni ankoraŭ multajn trompiĝojn, sed certe estas, ke per nia persistemo ni venkos ĉiun malhelpaĵon. Ni staras sur la sojlo de nova esperanta periodo, ni penu, ke ĝi estu la sojlo de ĝia pli bona estonteco!

*La redakcio.*

## NIA KONFERENCO.

Kiel estas al multaj bohemaj esperantistoj konate, okazis la 9. de decembro p. j. en la malgranda salono de restoracio Brejška en Praha konferenco de bohemaj esperantistoj. Ĝi estis iniciatita de la Laborista societo esp. en Plzeň kaj aranĝita de la samurba Esperantista klubo. La konferencon partoprenis ne tute 40 personoj sed la alsenditaj leteroj montris kia intereso regas inter la bohema esperantistaro al la temo pritraktota. Ni neniel dubas, ke de tiu ĉi kunveno datiĝos nova periodo de la bohema vivo esperantista.

La konferencon malfermis en la nomo de la Esperantista klubo en Plzeň ĝia vicprezidanto So. revidento Fr. Fikrle bonvenante la partoprenantojn kaj petante, ke oni elektu prezidanton kaj protokoliston de la kunveno. Por ke oni ne povu riproĉi al la traktado de la konferenco iun partiecon estis por prezidanto elektita So. Jos. Horák, kapelestro de la 69. inf. reg., kiu estas membro de neniun centra organizajo esperantista. Protokolisto estis So. Koutek, mag. revidento el Praha.

So. Bed. Tittl, sekretario de la Esp. klubo en Plzeň, prezentis raporton pri la preparaj laboroj por la konferenco jene:

„Laborista soc. esperantista en Plzeň sendis al ni antaŭ unu monato proponon, kiu celis eldoni esperantan gazeton. Ni scias ja, ke la cirkonstancoj ne estas por tiu ĉi

entrepreno tro allogaj, sed post serioza konsidero ni decidiĝis proponi al la bohema esperantistaro la eldonadon de neŭtrala komuna organo. Kiel bazo por la plua traktado ni starigis jenajn punktojn:

1. La gazeto estu komuna posedaĵo de ĉiuj bohemaj esperantistoj.

2. La bezona fondkapitalo estu akirota per obligacioj po 10.—K.

3. La gazeto estu progresema, severe demokrata kaj tute neŭtrala, kaj ĝiaj kunlaborantoj estu la ĉefaj bohemaj esperantistoj.

La tempo, kiu alportis al nia gazeto nepran unuecon ŝajnis al ni konvena por nia entreprenoj kaj ni ĝojas, ke la akcepto de niaj proponoj kaŭzos ankaŭ la unuiĝon de tuta bohema esperantistaro. La 1. cirkuleron, en kiu ni klarigis nian aferon, ni sendis al ĉiu bohema esperantisto, kies adreso estis al ni konata. La rezultato estis por ni surpriza. De ĉiuj flankoj venis nur konsentaj respondoj kaj ni ĝoje povis konstati, ke same kiel ni, sentas ĉiu amiko de bohema esperantismo, senescepte ĉu li apartenis al tiu aŭ alia centra organizaĵo. Mi atentigas, ke nian cirkuleron ne respondis ĉiu adresito kaj ĉefe mi bedaŭras, ke la Bohema Unio Esperantista lasis nian cirkuleron ne respondita. Sed mi plene esperas, ke post kiam la oficialaj reprezentantoj de tiu ĉi organizaĵo konvinkiĝos pri nia nepra senpartieco kaj sincera peno helpi al la bohema esperantismo, ke ĝi ankaŭ prezentos sian manon al la amika kunlaboro. El la personoj, kiuj al ni kuraĝige respondis ni citas: Soj. Em. Batěk, Říčany—Dr. Schulhof, Pardubice—J. Jelínek, Kukleny—F. X. Kučera, Kněžves—Dr. St. Kamaryt, Praha—J. Podlipský, Smíchov—Prof. Pitlík, Krakov—Čefing. R. Novák, Pola—Mil. Lukáš, Jičín, t. t. en Rumanujo—R. Nový, Kladno—Kudela, Olomouc—R. Dostál, Vídeň—J. Springer, Praha—Dr. Skláda, Unčov—R. Hromada, sekretario de la Boh. soc. esp. Praha—Finoj. J. Šupichová, S. Dlouhých, Praha—Sino. Berta Kejzlarová, Červený Kostelec k. a. Ĉi tiuj favoraj eĉ entuziasmoplenaj leteroj montras al ni, kia intereso estas inter la bohema esperantistaro kaj la hodiaŭa konferenco—diras So. Tittl—devas decidiĝi, ĉu eldoni la gazeton aŭ ne."

Post la vortoj de So. Tittl klarigis So. Pech, delegito de Lab. soc. esp. Plzeň, la maskon de la ideo eldoni esp. gazeton dirante, ke en la lasta tempo sukcesis al So.

Markvart ekkonduki en la gazeto „Mladý Socialista“ per helpo de ĝia neinformita redaktoro kontraŭesperantan rubrikon, kie li penas per la delonge konata idista maniero ataki esperanton kaj ĝian movadon. Kaj ĉiu ago kaŭzas opozicion: la plej bona kaj efika respondo estos kuniĝi kaj montri nian fortorecon kiu ĉiam kreskas kaj kiun povas la idista malamo nur pligrandigi, sed neniam skui.

Post prezento de la budĝeto per So. komercisto Kavan el Plzeň disvolviĝis vigla diskuto, kiun partoprenis Soj. Prof. Kamaryt, fin. kom. M. Schmidt, Hromada, Ditt- rich, Springer kaj Tuček el Praha, Fikrle, Kavan, Novák, Pech kaj Tittl el Plzeň k. a., kiu estis finita per akcepto de la tri punktoj proponitaj de So. Tittl:

1. La gazeto estu eldonata.

2. Provizora eldonanto estu la Esperantista klubo en Plzeň. (Ĉar estante membro nek de Asocio, nek de Unio, ĝi estas tute neŭtrala.)

3. Oni kunvoku duan konferencon al kiu estos invitataj la oficialaj reprezentantoj de „Bohema Unio Esperantista“, de „Bohema Asocio Esperantista“ kaj kiel eble plej multaj bohemaj esperantistoj, kiu traktos pri la kuniĝo de bohemaj esperantistoj kaj kiu difinos la definitivan eldonanton.

Poste oni komencis trakti pri redaktoro kaj pri redakcia konsilantaro. So. Tittl rekomendis ne lasi al la elektota redaktoro plenan liberecon rilate la enhavon de la gazeto, sed kontraŭe, ke la tuta konsilantaro decidu pri la presotaj artikoloj. La baloto pri la redaktoro estis sekreta. Preskaŭ ĉiuj voĉdoniloj subtenis la alvenintan skriban proponon de prof. Aug. Pitlík, kiu rekomendis So. Tittl el Plzeň. Por la redakcia konsilantaro estis elektitaj: So. J. Pech, deleg. de Laborista soc. esp. Plzeň, So. Kavan, deleg. de Esperantista klubo en Plzeň, Fraŭlino Julie Šupichová, instruistino en Praha kaj So. Peterle, delegito de Laborista grupo esp. en Doubravka.

La fina decido estis: Fondi Esperantistan presan kaj eldonan societeton, kiu estos firme lege protokolita. La pagopromesoj, kiujn oni sendis al la Esperantista klubo en Plzeň, estos kredititaj per la obligacioj de la nomita societo. La prezidanto de la prepara komitato estas So. Jos. Springer, eldonanto kaj librovendisto en Praha. Ĉiaj membroj estas: Soj. Dr. Kamaryt, fin. kom. Schmidt, Hromada el Praha kaj Fr. Kavan, komercisto el Plzeň.

Ni deziras, ke la laboro per la konferenco tiel sukcese komencita alportu al nia bohema movado esperantista tion, kion ĝi nepre bezonas: reviviĝon de la vera samideaneco.

*Dr. Stanislav Kamaryt:*

### UNUANIMECO.

Per la devizo de la unuanimeco oni ofte kuracas socian malsanon; en kelkaj sferoj sociaj kaj naciaj preskaŭ ĉiam. Ankaŭ en la poresperanta movado. Do, ĝia ideo estis ĉe ni tre estimata kaj amata ĉiam. Ideo de unuanimeco estis rigardata kiel universala kuracilo de sociaj malpacoj. Kvankam la sociaj malpacoj estas tiel antikvaj kiel la socio mem, tamen ili ĉiam estas rigardataj kiel io nenatura. Unuanimecon postulas ne nur ĉiuj beati presidentes, sed eĉ la atakantoj en la nomo de novaj celadoj. — Do, kuracilo vere universala.

Universalaj kuraciloj estas suspektaj. Ne sole en la terapio medicina, sed ankaŭ en terapio socia. Ĉu ankaŭ tiu deziro de la unuanimeco, tiu brila devizo, per kiu oni tiel sukcese venkis kaj ĝis nun venkas tiom multe da batalantoj de la plej nobla koro sole pro tio, ke ili ne konsentas kun la meza plimulto, predikanta kaj iranta la oran mezan vojon, ne estas suspektinda, ne estas malutila? Ĉu la unuanimeco ne estas la reakcia instrumento, kiu helpas neniiĝi kia ajn progreseman tendencon?

Certe estas, ke la devizo de la unuanimeco estis ofte malbonuzata de partioj malprogresemaj. Carismo proklamadis bezonon de unuanimeco plej laŭte kaj ĝiaj teoriistoj pruvadis, ke la unuanimeco estas bezona por halti ĝian sistemon, ke specialeco de ĝia regado bezonas unuanimecon kiel la plej firman apogilon de ĝia kresko kaj daŭro. Preskaŭ ĉiuj malprogresemuloj uzadis tiun unuanimecan devizon. En ĝia nomo oni bruligadis, pendigadis kaj komencadis sango-plenajn militojn, oni tiel faras ĝis nun.

Tial okazas, ke la ideo de la unuanimeco estas de multaj personoj rigardata kiel ideo malutila, malhelpilo de la progreso. Ĉu do povas la unuanimeco esti helpilo en nia poresperanta movado, en la movado, kies celo estas enkonduki tiel radikalan simpligon en la tekniko de interhomaj civilizaciaj rilatoj? Multaj amikoj de la lingvo internacia proklamas, ke la unuanimeco estas por la sukceso de nia laboro absolute necesa; la malplimulto kontraŭe pensas, ke la interna batalo estas dokumento de vigla interna vivo

de la movado, ke ĝia ĉeso signifus perdon de la progreso, de la kapablo paŝi antaŭen kune kun la interna ideo de la epoko, sekve, ke la unuanimeco neniel estas dezirinda en nia movado.

Kie estas la vero? Certe tie, kie ĝi estas en aliaj fakoj de la tuthomara celado. Movado esperanta estas sole parto de la tuthomara movado, celanta simpligon de la internacia kulturo. Celado al vero estas la plej ĉefa tendenco, ĝi fariĝis speco de racionalisma instinkto. La homaro celas la universalan sistemon de la mondo kaj de la spirito. Celado al la unueco estas la plej malsupra fluo de la nuna tendenco kultura. Ne sole la ekstera mondo, sed ankaŭ nia homa interno devas celi la unuecon. Laŭ tiu vidpunkto la unuanimeco estas la ĉefa virto, al kiu devas evolui etika universo.

Estas tre rimarkinde, ke la unuanimeco estas la virto, al kiu oni celas, evoluas, finfine venas, ke ĝi estas celo, sed ne instrumento, per kiu oni kreus universalan idearon. Ni vidas, kia unuanimeco povas esti utila por la kultura movado. Unuanimeco, al kiu venos ĉiuj laborantoj por la sama celo, unuanimeco, kiu estas rezultato, ne komencakondiĉo.

Ne estis unuanimeco en estinta tempo inter la bohema esperantistaro. Estis viglaj diskutoj pri la metodo de propagando, pri la ebloj de la lingva evoluo, pri la personaj kapabloj kaj virtoj. La diskutoj estis pli ol viglaj, ili montriĝadis en senrespektaj polemikoj kaj eĉ en laŭtaj scenoj dum la kunvenoj reprezentaj. Jus antaŭ la mondmilito la ondo de la bohema esperantista vivo estis en malalto. Kaj la milito forblovis ĉe ni, same kiel ĉe la aliaj aŭstriaaj nacioj la publikan intereson por la lingvo internacia. Niaj gazetoj malaperis, societoj ĉesis funkcii. Feliĉe, tio okazis nur ĉe ni. En aliaj landoj ne dormis la publika esperantista vivo tiel bone kaj longe, kiel ĉe ni, ĉar ĉiuj ĉefaj gazetoj eliradis daŭre. Nur post tri jaroj rekomencas nia vivo kultura kaj kun ĝi eĉ la esperantista. Sed certe neniu el ni, kiuj staris en unuaj vicoj de nia movado, ne ĉesis mediti pri la proksimiĝo de nia celo. Tial oni povas esperi, ke ni ĉiuj estas pli proksime al nia idealo, kaj pli proksimaj al la unuanimeco, kiun mi montris kiel rezultaton de sukcesaj ideoj motivoj. Tial mi esperas, ke nun estos pli multe da ĝi inter ni, ol estis antaŭ tri aŭ kvar jaroj. Mi esperas, ke ni nune celos unuanimecon en vero, kiu estas virto ne facila, ne simpla, virto derivita, sed tial unu de la plej meritplenaj virtoj.

Kaj por fini persone, mi povas sincere diri, ke mi estas tute preta fordoni miajn esperantistajn funkciojn, se ĝi estos por la progreso de nia movado bezona, kaj se mi havis tiom da influo por esti baro de la sukcesa esperantista kunlaboro.

## JESZCZE POLSKA NEZGINELA!

(Ankoraŭ Polujo nepereis!)

La nacia tragedio de malfeliĉa Polujo ekstremiĝis denove la Eŭropon. Kiu ne rememorus la faman Grekan miton pri martiro Promotheus? Dio Promotheus prenis el dia forno de Zeus fajron kaj alportis ĝin al la homaro, kiu ĝin uzis por ĉiuspecaj eltrovaĵoj kaj por regado en la naturo. Pro tio estis Promotheus alkatena al la roko de sovaĝa Kaŭkazo. Ĉiutage alflugis aglo formanĝi al Promotheus pecon da hepato, kiu dumnokte ree alkreskiĝis. La alforĝita dio rigardis senpove la propran martiradon, la aglon kiu ŝiregis la vivan, per la dolorego turmentitan korpon. Li silentis kaj suferis, ĉar li estis katenigita, sed tamen li ne mortis: la aglon oni mortpafis kaj li estis liberigita.

La turmentegoj de Promotheus estas la destino de Polujo. El la viva korpo de tiu malfeliĉa ŝtato lacigita pro disigemaj registaroj de sentaŭgaj reĝoj kaj pro antagonismo de potencaj princaj gentoj, deprenis en la jaro 1772 dum la regado de Marie Terezie la potencaj najbaroj, Prusujo, Aŭstrio kaj Ruslando vastajn regionojn, kiujn ili alligis al siaj landoj.

Ĉiuj esperoj fiksiĝis al la franca revolucio. Oni organizis Polajn legiojn en Francujo kaj Italujo, kaj batalis sub la standardoj de l'Franca respubliko kaj poste en la imperiaj armeoj de Napoleono. Sed Napoleon kaj Francujo estis venkitaj kaj la Viena pacinterkonsento en la jaro 1815 aljuĝis al Aŭstrio Galicion. La ceterajn landojn oni donis parte al Prusujo, parte al Rusujo. Restis sole malgranda respubliko Kraków, kiu en la jaro 1846 estis de Aŭstrio definitive okupata.

Polujo malaperis de l'geografia karto sed ne pereis. Restis ĉi tie ankoraŭ granda, kaj kulture potenca nacio, kiu konservis sian tutan vivon por la rekonstruo de l'propra ŝtato, kaj memdestina rajto.

Same kiel aliaj kulturŝtatoj, ankaŭ Poloj atendis de mondmilito la renaskigon de sia ŝtato. Ili batalis sub Aŭstria kaj Germanaj standardoj. La Pola junularo de lernejaĝo

verŝis sian multvaloran sangon en polaj legioj pro sopiroj de l'tuta Polujo. Kaj nun post tiuj tre solenaj promesoj, estis interkonsentita paco kun Ukrainujo. La gubernio Cholmsk, parto de rusa Polujo, estis de la central-ŝtatoj transdonita al Ukraina respubliko. Kaj el Germanujo aŭdiĝis firma decido, ke la German-Pola limo estos puŝata pli orienten.

Granda malĝojo kaj doloro ekregis Polojn de ĉiuj klasoj. La Poloj kuniĝis al la batalo por la malfeliĉa Polujo. La Pola junularo kaj Pola laboristaro kiel avangardo troviĝas en la plej unuaj vicoj.

Povas laŭ tio Polujo ne ekzisti? Polujo ekzistos, ĉar estas ĉi tie Poloj, estas ĉi tie sankta harmonio. Je kiom, pli malbone estas ĉe ni en Bohemujo! La bohema laboristaro en la plej fatala momento estis perfidonta la sanktan aferon de l'Bohema ŝtato. Ne kaj ne! La Bohema laborista junularo, la junularo socialista ne iros tiun vojon, sur kiu iras tiuj, kiuj volas la aferon de l'bohema memstareco disigi de l'afero laborista. Ĉu ni devas esti eble en estonta Eŭropo la sola gento kun la ciganoj — kiu sian propran ŝtaton kaj la rajton de l'memdestino ne devas posedi sole pro tio ĉar ili ne scipovas ĝin energie postuli? Ni imitu la grandiozan ekzemplon de Pola konkordo. — Ankoraŭ Polujo ne pereis — (Jeszcze Polska niezginęła) — ne pereis ankoraŭ la Bohema memstareco!

*El Omladina.*

*F. Kavan, komercisto.*

## KOMERCO KAJ ESPERANTO.

Ne ekzistas eble tiel signifoplenaj du vortoj, kies tasko, kaj funde prilaboranta kampo estas la tuta mondo, kiel ĵus tiuj du konceptoj: „Komerco kaj Esperanto“. Kaj ĉar la deveno de l'komerco havas multe pli malnovan daton, kaj ne estas bone konate, kiam la unua komercado naskiĝis, tamen certa estas ke la graveco de l'komerco montriĝis jam en la griza antikveco do, ni donas al la komerco la unuan lokon; letere, eĉ nun, en tiu progresema tempo, la mondmilito jetas nin returnen al la plej primitiva komercado per interŝanĝado, kiu nun ĉe ni tiom enradikiĝis.

De alia flanko, la komerco estas tre grava parto de l'homa penado. Jes, la komerco, ĝi estas, kiu senĉese importas, kaj eksportas diversajn en-, kaj eksterlandajn fa-

Dr. Stanislav Schulhof:

### ĈU DEVAS ESTI TIO?

El tuta mond' teruraj krioj  
alflugas jarojn jam al nin,  
sur disbatitan urbon, teron  
homaro verŝas sangon, feron  
kaj nevidebla ĝis nun fin'.  
De la Isonz' ĝis Som' kaj maro  
timego, ploro sen komparo,  
de Alpmontar' ĝis al Rusio  
— ĉu devas esti tio?

Kaj ĝis nun nesufiĉe havas  
nesatigebla homa drak'!  
Antaŭ ol pasas tag', monato  
denove vicojn vokas ŝtato  
kaj ripetigas la atak'.  
Milmiloj kie kovras teron  
pliigi urĝe la numeron —  
diskrevu kor', vastiĝu krio  
— ĉar devas esti tio.

Plej bela part' de l' mond' ĉu scias  
vi, kia estos via fin'?  
Ĉu scias vi, unuaranga,  
ke sort' ekkaptis vin plej sanga  
kaj jetas vin en la ruin'?  
El frukt' de viaj cerb' kaj sperto  
fariĝas rubo kaj dezerto,  
anstataŭ vivo — agonio —  
— ĉu devas esti tio?

Ho, eble tiel esti devas  
por sur alta kamp' kaj hum'  
el viaj plor' kaj sang' kaj ĝemo  
elkresku nova bela semo,  
kiu disiĝis en mallum'.  
Jen fin' de tragedio via!  
El mort' elkreskas mond' alia  
kaj polvo origin' de ĉio —  
laŭ leĝ' eterna devas esti tio.

Dr. Stanislav Schulhof:

### ZDA BÝT TO MUSÍ?

Z všech konců světa zvěsti děsné  
k nám létají již řadu let,  
květ lidstva teplou svojí krví  
zem rozdrásanou kropí, mrví  
a konce psud nevidět.  
Od Soči k Sommě, v širé moře  
se úzkost vzmahá, pláč a hoře,  
od strmých Alp až v pláně Rusi  
— prý být to musí.

A posud toho nemá dosti  
ta nenasytná lidská saň!  
Než měsíc přejde, týden mine,  
zas země volá řady jiné  
a nová zas se kuje zbraň.  
Tam, kde již leží na tisíce,  
je třeba nových, víc a více —  
až srdce puká, pláč nás dusí —  
— vždyť být tak musí.

Ach, nejkrásnější světa díle,  
zda víš, kam padáš v tyto dny?  
Zda víš, že tebe, kterýs posud  
šel v předu, chopil krutý osud  
a v zmar tě vrhá bezedný?  
Co's zasel, tvořil po staletí,  
se v pouště mění, v rum a smetí —  
až žít i dcofat již se hnusí —  
— což být tak musí?

Snad být tak musí, aby jiní  
zas v jiných světa končinách  
si nové vytvořili mety  
a zvedli z prachu krásné květy,  
jež pošlapal jsi v bouřích, tmách.  
Jen dál v té tragedii smrti!  
Svět vždycky vznikal z prachu, z drti,  
nic život jeho neudusí —  
dle věčných řádů být tak vždycky musí.

brikajojn, kaj ĉiuspecajn produktaĵojn, de unu mondo-parto al la alia, tute indiferente al kiuajn nacio ĝi apartenas. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, dum ankoraŭ furiozanta mond-milito, la komerco ne volas lasi nin ĝeni en la komercistaj rilatoj kun malamika lando, kaj en sia eltrovema penado ĝi eĉ riskas spite la severe malpermesitaj rilatoj fari negocon, sole pro tio, ke la koncernataj komercaĵoj estas por la ĉiutaga vivo tiom urĝe necesaj. La komerco penas, kvazaŭ per iu magia forto, alporti al la homaro ĉion,

kio mankas al ĝia regula kaj natura evoluo. La konata Adam Smith diris ja, „ke la komercistoj importadas kaj eksportadas la kuraĉilojn, same bone kiel, la venenojn. Jes, la komercisto vendus, se tio estus ebla, eĉ kampojn, kaj herbejojn en fremdlandon. Kaj li eĉ forvendus la lastan peceton de l' hejma tero, kaj enŝipiĝinte la propran personon, li eksportus sin mem!“

Sed ĉiu laiko devas ja konfesi, se la traktado de tia grava signifo inter du seriozaj partioj, ofte al si tiel fremdaj, kaj tiel mal-

proksimaj, se tiu traktado devas esti simpla, flua kaj preciza, estas urĝe necese, ke ekzistu iu interkomprenilo. Kaj tiu jam elprova interkomprenilo estas, en plena senco de l' vorto la internacia Zamenhofa lingvo „Esperanto“. Jam nun, dum ĝia tridekjara ekzistado ĝi enradikiĝis en ĉiuj kulturŝtatoj de l' tuta terglobo, kaj estas de multenombra eminentularo akceptata kiel tre uzinda kaj tre konvena lingvo internacia por ĉiuj fakoj. Sed ĉefe pro tio, ke ĉiu, eĉ ne multe klera homo, ĝin povas perfekte ellerni. La principo por lernado de Esperanto estas: „Por Esperanto monatoj, por naciaj lingvoj jaroj.“

Kiel jam supre menciite, tiuj, du elementoj, Komerco kaj Esperanto havas ambaŭ vastegan agadkampon. Tial estas necese, ke oni pensu kunigi de l' pratempo ekzistantan komercon, kun tre juna progresema Esperanto, kaj ke la ambaŭ elementoj sin reciproke subtenu.

Kia urĝa bezono de lingvo internacia aperas en la nuna tempo, pri tio konvinkigas milionoj da homoj en la mondmilito, kiu pelas ĉiutage milojn kaj centmilojn da diversagaĵaj viroj en fremdan kaj tute nekonatan landon, kaj en diverslingvajn regionojn. Kiu iam travivis ĉion ĉi tion, tiu certe spertis, kiajn malfacilaĵojn li renkontis, prizorgante al si la plej necesajn, kaj plej primitivajn aĉetaĵojn, nur pro tio, ke li ne povis interkompreniĝi kun la koncernata nacio.

Mi estas konvinkita, ke la centmiloj da anoj de ĉiuj sociaj klasoj komprenigos al si la neceson kaj nepran bezonon de lingvo internacia ke baldaŭ aperos sennombra aro da novaj propagandistoj de tiu nobla ideo, ĉar Esperanto havas siajn anojn kaj bonegajn organizaĵojn sur la tuta terglobo, kiuj povas bone servi al ĉiuj bezonoj de l' homa vivo. Esperanto havas jam propran riĉan literaturon, kiel originalan, tiel ankaŭ tradukaĵojn de la plej gravaj verkoj de ĉiuj nacioj. Laŭ tio ĉiu bone komprenos, ke al Esperanto proksimiĝas la plej brila estonteco.

Ankaŭ ĵus aperanta tutmonda demokratismo, disĵetanta siajn ondojn sur la vastegan surfacon de nia terglobo, certe akceptos senhezite la plej demokratian ideon de l' Esperantismo. La interkompreno estas nun al malpacigiĝintaj nacioj, (kaj ofte batalantaj eĉ kontraŭ siaj konvinkoj) tiom bezona. Jes, tiu interkompreno, kiu estas la sola bazo de l' paco, tiom sopireme deziranta paco, kiun eble eĉ la plej venkanta Anglo mem ne rifuzus.

## LA SÓNORILO SUR LA MARA FUNDO.

El la parolado de l' bohema deputito R. Bechynaĉ.

Sur la bordo de Norda maro troviĝis malgranda komunumo, kiu floris per feliĉo kaj bonstato. Kaj la popolo fabele rakontis, ke la kreinto de la bonstato kaj feliĉo estas arĝenta koro de la sonorilo, kies sonoj ĉiutage sonis super la komunumo. Sed venis ventego, la marondoj forprenis la sonorilon en profundajon kaj malriĉeco kun mallibereco venis en la vilaĝon. Kaj de tiu tempo vivas inter la popolo kredo, ke venos momento, kiam nova ventego levos la sonorilon el la abismo de l' oceano, ke ĝia koro denove batos kaj redonos al la popolo ĝiajn feliĉon kaj kontenton. Ĉiam dum uragano venas super la maron, la loĝantoj eliras sur la marbordon por aŭskulti, ĉu aŭdiĝos el la profundego la sono de l' sonorilo.

Amikoj — ĝi estas ja nia bohema kredo, ĝi estas ja nia bohema espero! Ankaŭ nia sonorilo subakviĝis dum monduragano, sonorilo de nia memstareco, kaj ni estis jetitaj en malriĉecon kaj malliberecon. Sed en niaj koroj neniam mortis kredo, ke denove estos alie. Ĉiam dum Eŭropo sin preparas por ventego, ni aŭskultas, ĉu aŭdiĝas sonoj de l' arĝenta sonorilo.

Kaj en tiu ĉi milito, en kiu ekmoviĝis la plej subaj profundajoj, ni aŭdas sonojn de tiu ĉi sonorilo tute klare. La koroj de l' sonoriloj batas ilian korpon kaj unuigas kun batado de niaj koroj en unu granda himno de la libereco kaj la memstareco! Ni kredas ke plenumiĝos vortoj de nia granda Cernius pri la memstareco de nia nacio.

*Trad. Rud. Hromada.*

*J. Pech:*

## EN MODERNA BABILONO.

Ne kredu, ke mi intencas skribi pri mia vojaĝo tra Egiptujo aŭ Palestino. Ankaŭ mi ne volas rakonti pri diversaj aventuroj okazintaj en tiuj landoj, pri faraonoj a. s. Tie mi neniam estis, kvankam ĝi de longe estas mia sonĝo, sopiro, deziro.

La monda milito miksis la naciojn. Ĉiun momente vi renkontas fremdulon, kiu demandas vin pri io, sed vi ne povas respondi al li, ĉar vi ne komprenas, kaj vi devas stari kvazaŭ mutulo. Al vi tial ŝajnas, ke vi ne estas en via hejmo, sed ie, inter la miksitaj loĝantoj de Babilono.



Kompreneble, sen grava meditado estas videble, kian servon povus nun far esperanto, se oni ĝin estus lerninta ĉie antaŭ la milito: similaj malfacilaĵoj certe ne povus nun okazi.

Neniam estis la lingvo internacia pli bezona ol en la nuna tempo, kiam la scio eĉ de kelkaj naciaj lingvoj al ni ne sufiĉas. Nun, kiam vivas en Bohemujo vico da diversaj nacioj — certe plej malmulte dudek — estas ridinde skribi pri utileco aŭ bezono de la lingvo internacia. La milito nin multe instruis. Post la milito preskaŭ ĉio reformiĝos, multaj reformoj estos farataj, reciproka informado kaj la interrilatoj kun fremdlandoj estos necesaj, ĉar tio proksimigos la komanan amikecon.

Nova periodo post la milito komencos, grava tasko atendas ankaŭ la turismon kaj al la turismo helpas esperanto. Tial estas necese enkonduki la lingvon internacian en turismon. Tie ĝi povas esti ĉefe uzata kaj ankaŭ facile disvastigata. Milionoj da homoj ekkonis, ke nia nacio vivas, ke ĝi havas grandan kulturon. Milionoj da homoj interesiĝas pri nia nacio kaj tion ni devas eluzi. Niaj turistoj povas per helpo de esperanto informi fremdlandanojn pri nia patrujo. La helpa lingvo estas bona rimedo por proksimiĝi al homaro eĉ por helpi al la celoj de la tutmonda laborista movado.

*MUDr. St. Schulhof:*

## KIA LABORO NIN ATENDAS?

Post longa ripozo ekpaŝas nia bohema esperantistaro en novan vivon. La situacio ne estas kompreneble tiel favora, kiel ĝi estis antaŭ la monda milito, tamen ia ajn plua atendado de pli bonaj kondiĉoj estus prokrasto ne pardonebla. Estas ja eble, ke la monda paco nin surprizos, tute same, kiel nin surprizis la mondmilito, kaj nur tiam komenci nian novan laboron ne estus rekomendinde, ĉar eble la komenca tempo de la paco estos pli malkvieta kaj pli zorgoplena, ol la tagoj, kiujn ni ĵus travivas. Tial estas nepre necese komenci tuj, kvankam, kiel ni jam diris ne ekzistas ankoraŭ la plej konvenaj kondiĉoj. Antaŭ ĉio mankas al ni la plej riĉa kaj neelĉerpebla fonto de nia vivo: niaj rilatoj internaciaj. Estas eble, ke ĉi tiuj rilatoj ankoraŭ longe post la milito ne estos tiel liberaj kaj viglaj, kiaj ili foje estis, sed, se ni ne volas perdi ankoraŭ pli da multekosta tempo, ni devas komenci sen tiu ĉi plej esenca vivkondiĉo.

Feiĉe nia movado post sia tridekjara ekzistado posedas jam tiom da forto, ke ĝi povas vivi kelkan tempon sen ĉi tiu fundamenta kondiĉo. Oni devas nur ĉi tiun seninternacian periodon eluzi por laboroj, kiuj estas por ni tre necesaj, kaj kiujn ni, bohemiaj esperantistoj, ankoraŭ malatentadis kaj eble eĉ ne sufiĉe funde pripensadis.

Sur monda literatura forumo ne estas ni kaj nia bohemia nacio tiel inde reprezentataj, kiom apartenus al nia sufiĉe longa ekzisto de nia movado. Certe la tradukoj de romanetoj de Arbes, kelkaj artikoloj kaj laboroj pri Hus, Vrchlický kaj altaj bohemiaj literaturistoj estis laboro plenmerita, tamen ĉi tiun laboron ni neniel povas kompari kun tiu de polaj kaj alinaciaj esperantistoj. Oni ne opiniu, ke ni volas per tiuj vortoj taksati la laboron de niaj esperantistoj malpli valora tute ne, ni ja plene komprenas ilian malfacilan situacion, ni eĉ scias kia estis la kaŭzo de nia sensistema laboro: nia desorganizacio. Sed eĉ ne tiu ĉi konstato volas esti riproĉo por niaj unuaj esperantistoj. Kion ni povis atendi de niaj samideanoj, kiam la tuta nacia vivo nia estis plena je partioj, kiuj sin reciproke insultadis kaj kalumniadis, kiel eble neniam okazis en tempo antaŭa? Niaj esperantistoj certe ne estus homoj kaj membroj de sia gento, se ili ne estus infektitaj de tiu ĉi tutnacia miasmo.

Kaj nun, la milito kun siaj enormaj ŝanĝoj alportis al ni ion, kion ni foje eĉ ne kuraĝis elparoli — konkordon kaj unuecon, bazitan sur sana kaj firma fundamento, de ĝenerala interkonsento kaj forgeso. Ĉu estus eble, ke tiu ĉi nova nacia sento preterpasus nian movadon esperantista, kiu estas nur parto de nia nacia penado kaj laboro? En nuna tempo, kiam ankoraŭ ĉio estas duba kaj ne certa, en la tempo, kiam ĉiuj homoj perdis la kuraĝon profeti pri la aferoj venontaj unu estas certa: Nia nacio neniam plu revonos en la menciitan anarhion, kaj tute same niaj esperantistoj, ne povas komenci tie, kie ilin surprizis la malfeliĉa mondmilito.

Nova alvenis tempo nun tute novaj sentoj kaj bezonoj kaj ni, bohemiaj esperantistoj fariĝus anakromismo, se ni ne elŝirus el nia brusto jenan venenon, kiu nin en la pasintaj jaroj tiel ruinigis kaj malaltigis. Nia konstruado estas firma sed ĝi devas esti starigita sur nova, ŝtona fundamento kaj sur novaj kolonoj. La tempo de la desorganizo kaj de la anarhio jam pasis, ni do nin preparu kuraĝe al la nova ordo kaj disciplino,

## MAJSTRO NIA, DORMU DOLĈE EN PACO ETERNA.

Al ora esperplena familieto de nia Majstro Zamenhofo dediĉas Em. Batĉk, Řičany.

Angeloj, bonaj cignoj, ĉirkaŭas Dion,  
Esperplena familio gardas ĝardenon, har-  
monian horon!  
Indaj juveloj jus kantas: La Majstro nia,  
Oran pacon raportis, sed ŝireĝis tendencon  
Uragano. Ve! Zamenhofo!

Angeloj ploru, amo estis mortinta,  
Bonaj sentoj en koro brulkonsumiĝis.  
Cignoj blankaj gefiloj koreamataj  
Ĉirkaŭas kadavron de Majstro glorinda,  
Dion petantaj redoni Lian amon.  
Esperplena Majstro nia semon jetis:  
Familio volis rikolti la amon:  
Gardas severe la semaj-sanktan kampon,  
Ĝardenon, de la tuta paca homaro  
Harmonian konformiĝon nacian.

Horon ilian — kanonoj silentigis:  
Indaj Espersteloj jam migras „Hadeson“,  
Juveloj foriris post ilia Majstro,  
Ĵus, kiam laboro rapidis al celon.  
Kantas funebrefratoj amataj: „Lumo,  
La lumo! kie vi estas, kie? kie?“  
Majstro plorante ĝemas: „Mi ĝin ne vidas,  
Nia suno estas subirinta. Ho ve!  
Oran lumon de l' amo mi jam ne vidas!  
Pacort vi volas havi, homoj senkoraj?  
Raportis ĉu ne? jam mi tion, ke ĝi venos,  
Sed ĉiam per amo, ne perforte. Kies  
Ŝireĝis ĝin glavo sangon soifanta?  
Tendencon mian, kiu disbatis, kiu? —“  
„Uragano! Ĉar en la mondo ĝi regas!“  
Ve! — Doktoro Esperanto, dormu dolĉe!  
Zamenhofo, — pacon eternan Vi havas!

ĉar sen ili nia laboro estus tute sensukcesa, kaj ĉiu sukceso nur hazarda. Oni ja povas sen ĉiu granda disciplino organizi kunvenojn eĉ kongresojn, sed serioza kaj sistema laboro estas nur tiam ebla, kiam ĝi sin povas apogi sur firma, solida kaj sendisputa organizacio.

B. Tittl:

### „AMIKI DI LA LINGUO INTERNACIONA“.

Nenio estas por mi tiel abomena kiel fanatismo, rilatanta kio ajn. Kaj laŭ tiu ĉi mia sento mi ĉiam agas: Religie mi estas sen konfeso, sed tio nenio malhelpas, ke mi amike ne premu manon de bona kaj honesta katoliko — nacie mi estas sincera Bohemo, preta al mia patrolando kaj nacio oferi ĉion, sed samtempe mi estimas kaj ŝatas membrojn de kiu ajn kultura nacio — politike mi estas sendependa, sed ĉiam preta helpi al kiu ajn partio en ĝia penado celanta la progreson — mi estas sindona esperantisto, bone sciante, ke la lingvo de Zamenhof ne estas absolute perfekta, sed tamen malplej simpatia estas al mi Ido, tiu Ido, kiu sin intrudas esti ido de Esperanto.

Baldaŭ pasos dek jaroj de kiam mi aĉetis en Dreseno broŝuron, kiu sin montris en ĉiuj librovendejoj: „La reforma demando“. Ĝi estis kaŝita en ruĝa banderolo, kiu estis surpresita per la vortoj: „Verko malpermes-

ita en Esperantujo“. Jam de mia junaĝo logis min ĉio malpermesita kaj tial mi avide trastudis eĉ tiun ĉi „malpermesitan verkon“. Tiam mi loĝis en negrava saksa urbeto, kie mi sekrete komencis idistiĝi. Precize mi konatiĝis kun la decidoj de la „cienczoa delegacio“ kaj komence la proponitaj reformoj ŝajnis al mi tute ĝustaj, ĉar ili ĉefe parolis pri la forigo de la multenombra finigo -j. kiu al mi Bohemo ne plaĉas, kaj ŝanĝis la diftongojn -aŭ- en -e-, kiu estas pli belsona. Neniu aŭtoritato estas tiel potenca por katenigi miajn pensojn kaj tial post nelonga tempo mi kritike akceptadis la decidojn de la nove fondita idista akademio. Baldaŭ estis al mi tute klare, ke la amaso de la ĉiam naskiĝantaj „reformoj“ estas en sia granda parto tute arbitra eĉ senutila, mi sentis, ke la reforma ĉeno disŝiriĝas, ke oni ĝin flikas kaj kunigas per rustiĝinta metalfadeno. Mi ekkonis, ke la en pompo naskita ido estas idioto kaj mia entuziasmo por ĝi tute malaperis. Mi fariĝis por ĝi tute apatia, precipe post kiam mi sciigis, ke ĝi estis naskita en koto...

Vico da jaroj montris al mi, ke en mia antaŭsento mi estis tute prava: la ido en sia prudento ne maturiĝis, sed ĝi fariĝis tratbubo, kiu meritas fleksi trans genuon kaj amike lin batpuni, ju pli multe, tiom pli utile por ĝi.

En la landoj de bohema krono havas la ido kelkajn parencojn, kiuj penas surtronigi ĝin en la rolo de la lingvo internacia. Ĉiu

ja havas rajton propagandi kion li volas kaj eĉ tie ĉi mi estus tute neutrala, se mi nur ne estus atestanto de senkompara anatik-eco. Naŭzo vin premas se vi observas kiujn rimedojn ili uzas por atingi sian celon. Plej furioze ili batalas kontraŭ Esperanto — kiu ĉiam pli estas uzata en internaciaj rilatoj — eĉ kontraŭ ĉiu, kiu ĝin propagandas. Sur ilia pinto paŝis antaŭ la mondmilito so. Ch., kiu el fanatika esperantisto transformis sin (post la kongreso en Kraków, kiu lian parolon tute rifuzis) en fanatikan idiston kaj tuj komencis sian laboron. Antaŭ ĉio li, en vespera eldono de „Právo Lidu“, proklamis, ke esperantistoj dividiĝas en du partiojn: „unu, klerikale reakcia, t. e. fundamentistoj kaj duan, kiu konsistas el scienculoj, soc. laboristoj kaj progresemaĵoj personoj, kiuj celas perfektigi Esperanton“. En la semajna gazeto „Nár. Obzor“, kies redaktoro estis lia amiko, li publikis vicon da artikoloj, kie li atakis Esperanton, Dron. Zamenhof (kiu laŭ lia eldiro estas klerikala hebreo, kiu amas la orajn frankojn de fo. Hachette & Cie.), rektoron Boirac k. a. Por kaŝi la mizeron de idista movado li kutimis uzi diversajn subskribojn: Žakavec, Dometal, Chaloupecký k. a. Bedaŭrinde la gazeto, kiun li uzis por sia „propagando“ kaŭze de la milito malaperis. Mi diras — bedaŭrinde — ĉar alie ni certe estus ekkonintaj la fundon de idista marĉo. Alia modelo de la porida agado estas so. M., amiko de la antaŭe nomita sinjoro, kiu sin nun prezentas en „Mladý Socialistá“ per sia kontraŭesperanta agado. Mi ne havas la honoron koni tiun sinjoron persone kaj ankaŭ lia karaktero ĝis nun al mi ne estas klara, tial mi silentas pri li. Da similaj modeloj de idista „agado“ mi havas grandan provizon, mi konservos ĝin por la estonteco.

La idista propaganda maniero estas efektive karakteriza: Se vi estas persono publike konata kaj oni scias pri vi, ke vi estas amiko de esperanto, tiam vi certe fariĝos celo de idista „propagando“. Ili vin superŝutos per la kontraŭesperantaj presajoj, ili prezentos al vi subtile preparitajn komparojn inter la ida kaj esperanta tekstoj, vi konfesos, ke la esperanta finiĝo -oj sonas malpli bele ol la idista -i, kaj antaŭ ol vi povos ekkoni la amason da idaj sensencaĵoj, oni jam skribos en diversaj gazetoj, ke vi estas idisto, ke vi malaprobis esperanton. Jen mi povus citi rimarkindajn ekzemplojn. Mi konas personojn, kiuj tiamaniere „idistiĝis“ kvankam ili idon tute ne konas. Ŝajnas al mi, ke eĉ la

fama idisto prof. Ostwald idon ne konas, alie mi ne povas al mi klarigi, kial li (antaŭ kvar jaroj) respondis mian ide skribitan leteron germane. Mi petis lin klarigi, kial li opinias idon pli perfekta ol esperanton. La fama ĥemiisto respondis al mi tre afable per sufiĉe longa letero, sed mian demandon li tute ne respondis.

Nia kunlaborantino fraŭlino Ŝupichová gvidas en kelkaj gazetoj esperantaj rubrikojn, kiuj tre koleras idistojn. Antaŭ ne longa tempo estis kontraŭ ili aranĝita efektiva militiro idista. La tutan boh. idistaron oni mobilizis. Al ĉiu „amiko de la lingvo internacia“ oni donis poŝtmarkon kun postulo, ke li protestu. Sed la redakcioj tute ne ekstimis, kiam ili ricevis tri aŭ kvar kartojn, kaj la pene preparita ofensivo malsukcesis.

Tiu ĉi idista insidemo povus esti al ni ridinda, se ĝi rilatus nur esperanton. Sed la idistaj insidoj estas direktataj eĉ kontraŭ nia plej alta celo: oficiala enkonduko de helpa lingvo internacia.

Fundamenta esperanto estas nia rimedo por atingi ĉi tiun celon. Ni scias ja, ke la nemortebla verko de Zamenhof povas esti jen kaj tie kompletigita eĉ ankoraŭ pli perfektigita kaj eĉ nia Zamenhof tion klare proklamis. Ke nia rimedo estas bonrezulta, tion pravas la admirinda konstruado, kreita per tridekjara laboro de niaj antaŭuloj. Esperanto, nia rimedo, estas bonega kaj tial ni neniam ĝin ŝanĝos. Ĝi vekas ĉiam pli kaj pli grandan intereson pro siaj bonegaj ecoj: ĝi estas senkompare facila, klara kaj preciza. Ĝi havas rimarkindan literaturon, ĝi estas konata en ĉiuj landoj, multaj homoj ĝin parolas kaj tial ĝia konado alportas utilo al ĉiu, kiu rilatas kun fremdlando.

Kaj Ido? Por esti celo, t. e. definitiva lingvo internacia, ĝi enhavas gravajn erarojn, kion cetere konfesas eĉ la idistoj, partianoj de la „definitiva lingvo“, senpripense akceptante ĉiun ŝanĝon, diktitan de ilia Akademio. Por esti rimedo servanta por la atingo de la nomita celo, en la komparo kun esperanto, ĝi estas ankaŭ rifuzinda: ĝi estas tro komplikita — preskaŭ senutile — tiom komplikita, ke oni eĉ post longa studado ofte venas en embarason. Ĝi estas malfacile lernebla, precipe por homoj ne instruitaj — sekve ĝi ne estas lingvo demokrata, popola. Ĝi ne havas literaturon, ĝiaj partianoj estas malmultaj, sekve ĝia kono ne alportas gravan utilon. Ido malfacile konkuras kun esperanto. Tion bone spertis idistoj kaj tial ili sian idiomon kaŝas post la ŝildon de esper-

anto: esperanto reformita, esperanto perfektigita ili oficiale nomas sian idiomon. Neniam ili ĝin nomas nur Ido, bone sciante, ke tiamaniere ili certe malsukcesus. Kaj samtempe ili kolere batalas kontraŭ esperanto, volante ĝin halti en ĝia senĉesa antaŭenmarŝo.

La ĝis nun atingitaj sukcesoj klare kaj sendispute montris al ni, ke la vojo, kiun ni iras, estas ĝusta kaj tial ni ne lasos nin infiki per senutila reformemo. Ido ne prezentas reformojn, sed nur pli grandparte senutilajn ŝanĝojn kaj komplikojn. Per la plej severa unueco ni defendos nian Fundamenton ĝis ni venos al nia celo: enkonduko de la mondlingvo.

Obstineco de la pereiga laboro idista devas nin instigi al pli granda fervoro.

*J. S. Machar;*

### MARIA TEREZIA ORDENO.

Je la kvina horo matene elmarŝis bataliono de pafista regimento el ankoraŭ dormanta Příbram. La suno dispelis kelke da ruĝaj nubetoj kaj komencis iel gaje bruligi. Kiel hieraŭ, kiel antaŭhierau.

Kapitano Krihuber rajdis antaŭ la bataliono kaj tuis per sia matena tuso. „Mil diabloj,“ li murmuris kvazaŭ por si mem, sed tamen tiel laŭte, ke leŭtenanto, marŝanta fronte de sia kompanio, povis aŭdi, „jus hodiaŭ transdonas al mi la maljuna la komandon! Kompreneble, kiam venos marŝalo A. kaj ĉefgeneralo B., tiam estas Krihuber bona! Tirolanoj antaŭen! Ni ŝvitegos hodiaŭ, ĉu ne, filozofoj?“ li alparolis nun senpere la leŭtenanton.

La „Filozofoj“ devige ekridetis.

„La maljuna estas hodiaŭ inter la juĝantoj. Li sendube aŭdigos sin antaŭ la imperiestra moŝto kaj ĉefstabestro, ĉu ne?“ Kaj min kompreneble, li ŝarĝigis denove per tio plej malbona: la batalion-komando. Nun en tiu grava situacio...“

Sro subkolonelo konas ja siajn homojn ekparolis la filozofoj kiel kutime li ĉiutage faradis.

Li konis bone sian kapitanon. Krihuber sidis hieraŭ ĝis malfrua nokto kune kun adjutanto de l' generalo en la gastejo. Li lasis detale rakonti al si, kien morgaŭ „tio“ marŝos kaj kien taskon havos la bataliono, li esplordemandis la adjutanton, kiel eble tion aranĝi, trarigardis kun li la geografian karton; ĉion ĉi tion sciis la leŭtenanto, kaj sciis ankoraŭ, al kio la kapitano celas per tiu plen-

do: montri kiel grava li estas kaj ricevi almenaŭ aprobon de subalterna leŭtenanto. Kaj la filozofoj donis ĝin al li ĉiutage, ĉar Krihuber menciadis sian respondecplenan gravecon.

La suno brulegis. La soldatoj gaje babilis. Blua nubo de tabakfumo flugpendis super longa vico de l' bataliono kaj kunfluigis kun la suprenlevanta stratpolvo.

La leŭtenanto meditis pri sia amo kaj versoj, ĉar li estis poeto. Li sciis hazarde kelke da kronologiaj datoj kaj konis iomete la militirojn de Napoleono, pro tio la kamaradoj nomis lin filozofoj. Al ili ŝajnis almenaŭ, ke tiu koncepto per tiaj konoj plene identiĝas.

La suno brulegis.

Je sur disvojo staris du kavaleristoj. Subkolonelo, la batalion-komandanto, kiu estis hodiaŭ „inter la juĝantoj“, kaj la brigad-komandanto, maljuna eksterordinare grasa generalo kun vizaĝo forte rememoranta bonaniman gufon. La bataliono ekhaltis. La subkolonelo vokigis „sinjorojn“ al si. Parolis pri imperiestra moŝto, pri marŝalo, pri ĉefestro de l' generalŝtabo, pri la honoro de pafista bataliono, pri „fariĝo pli fervoraj“ k. t. p. Poste li alvokis la kapitanon Krihuber, por ke li diru la hodiaŭan taskon kaj disdonu la rolojn.

Krihuber disŝiris koverton, elprenis litografitan paperfolion kaj legis: supozeble, ke la malamika divizio havas okupatan Příbram, kaj elsendas unu brigadon kontraŭ ni. Ke nia pafista bataliono staras je maldekstra flanko, ke la defendadon de tiu flanko prizorgas la unua kompanio sub la komando de leŭtenanto Machan, kiu devas peni ekokupi iun, la regionon estratan rokon. (Leŭtenanto Machan, filozofoj, substrekis al si ion sur la geografia karto.) Cetere li, la kapitano Krihuber, juĝante laŭ la terraino, supozas, ke la malamiko penos venkobati nian centron, aŭ la dekstran flankon, kaj tial eble nia bataliono apenaŭ partoprenos la batalon. Tiu ĉi klarigo estas sole privata sciigo, la oficialajn raportojn ni aŭdos post unu horo sur batalionkunvenejo el la buŝo de l' generalo mem...  
[Daŭrigo]

### ŜUETO.

*Skribis Hana Michalovicová.*

Vi ĉiuj aŭdis jam pri feliĉstelo, kiu brilas ĉe la infannaskiĝo, profetdiras al ĝi la feliĉan kaj promesiĝan estontecon? Kaj konas ankaŭ legendojn pri la senbrila kaj malklara astro, kiu alportadas al la novnaskiĝintoj

malgajaj perspektivoj por la migrado sur tiu ĉi mondo? Vi ĉiuj konas tion, sed certe tre malmultaj el vi meditis pri tio kiel mi. Mia steleto eble nur flirtumis, ĉar ĝi kondutis tre malbone kontraŭ mi, kaj ĉiujn tagojn de mia vivo ĝi akompanas per la senĉesa malsukceso. Mi entrepenu kio ajn, ĉio finiĝas ordinare per mizera rezultato, en ĉio estas sole malfacilaĵoj, kaj malhelpaĵoj. sed ĉiukaze malagrablaj cirkonstancoj, kaj miaj spertoj estas riĉaj je malsukcesintaj idealoj, pereigitaj sopiroj. Kaj ĉio ĉi tio okazas tiel nature kaj aŭtomate, ke alie eble eĉ ne povas esti.

Mi demandas nun la obstinajn ateistojn, kiel ebla ĝi estas? Kial mi, senĉese persekutata de l' malsukceso ĉe ĉiu ekmovi, mi estas devigata rigardi kiel la aliuloj estas superŝutataj sole per ĝojo kaj feliĉo? Ĉu ili povas diri, ke tio okazas simple de si mem? Certe ne, ĉar laŭ miaj spertoj, io certe senĉese akompanas nin, io nerimarkebla de niaj sentoj, aŭ io troviĝas super ni, kio destinas la sorton al ĉiu el ni antaŭe. Jes, mi kredas la antaŭdestinon, kaj se iu el vi dubeme ridetas, venu nur al mi, kaj mi prezentos al li milojn da pruvoj, pri la ekzisto de mia malbona sorto.

Mi ne estas ja malriĉa, ankaŭ senofica, sed ĉiu mia penado, ĉiu ekmigro je la surtera feliĉo, kostas min superhoman penegon, kaj oftfoje ĝi ankoraŭ aliformiĝos je veneniga ironio!

Aŭskultu, nur, kion mi estis travivinta antaŭ ne longa tempo: Ĝi okazis en iu bela, printempa posttagmezo, kiam tre gajigita, kaj pro sopiro eĉ kortuŝita, de l' saturita printempa aero, plena je antaŭsenta, nova vivo, ĉar ĉie estas reviviĝo, ĝojo el la vivo, sentante agrablan odoron de l' revekiĝinta tero, mi promenis, kun mia amiko eksterurbe en la kamparo. La konfidiga tempo de l' ĝojoplena tago iĝis ankaŭ nin konfidemaj, kaj tuŝproksime irantaj, ni paŝis gaje tra la bela regiono. Ni komunikis unu al la alia la imagon pri la feliĉo. Niaj sopiroj estis ja iom malmalmaj, sed la tago estis tiel bela, la feliĉo ŝajnis esti tiel proksima, tiel facile akirebla, kaj ni, absorbitaj je babilado, plena de arda vervo, ni konfideme rigardis ĉielen. Ni eĉ ne rimarkis malgrandan nigran objekton, kiu kuŝis sur la vojo kondukanta al la vilaĝo, al kiu ni ĵus proksimiĝis, nur tiam, kiam ni troviĝis tute proksime de ĝi, mi kliniĝis al la tero, kaj ekprenis — malgrandan, nigran ŝuon.

Ni falis subite el la ĉielo, kaj fikse rigar-

dis la malgrandan ŝuon. La ŝuo estis knabina, filigrana ĉarma kun eta briletanta agrafio; ĝi logis nin rekte al la dolĉa revado. Senintence mi vidis en ĝi malgrandan, idele modelitan piedon, kaŝitan en diafana ŝtrumpeto, pli supre, super la maleoloj flirtis blanka, malpeza jupeto, al la kokso apogita, ideala, delikata maneto, subtenante tiamaniere la silkan talion kun neĝoblanka nuko. Kaj kiel krono teniĝis super tiu fantomo knabina, ĉarma kapo. La tuto de mia imagbildo, kies origino estis malgranda ŝueto, estis tiel alloga, tiel natura, ke mi mem, ebrigitita de l' printempo, vivo kaj la beleco, eliĝis el mia buŝo senpripense: „Mi ĵuras“, se sukcesos al mi trovi la posedantinon de tiu ĉi delikata ŝueto, mi faros ŝin mian edzinon!”

„Ĉu vi freneziĝis?“ jetis min de l' ĉiela revado mia amiko. „Kio okazos, se tiu virino estos malbela kiel infero, malriĉa kiel muso, kaj malsaĝa kiel juna leporo?“

„Tio ne estas ebla“, mi defendis persiste mian elravitan fantomon. „Rigardu, kiel eleganta estas tiu ŝueto, kiel belgusta. Kiu ĝin aĉetis, ne estis malsaĝa, kaj mi esperas, ke ankaŭ ne malbela. Lasu min nur aĝi, kaj vi baldaŭ ekvidos, kiel bone mi sukcesos!“

La amiko ironie ekridis, sed la aferon li tute ne prenis serioze. „Cetere, ŝi estu kiu-ajn, ni devas nun zorgi, ke la ŝueto baldaŭ troviĝu en la manoj de l' posedantino!“

Ni diskutis super tiu ĉi peco da virina tualetto, kiamaniere redoni ĝin, al kiu, kaj kien do kun ĝi. Fine ni interkonsentiĝis, ke ĝi eble apartenas al iu el la vilaĝo, troviĝanta antaŭ ni, kaj gaje ni ekiris tien.

[Daŭrigo]

## DE NIAJ SOLDATOJ.

Granda parto de niaj amikoj, kiuj en la pactempo fervore propagandis la ideon de nia Zamenhof estis vokitaj por defendi la interesojn de la ŝtato. Ili devis forlasi la kutiman komforton de sia hejmo kaj nun ili, malproksime de ni, plenumas sian devon. Meze de multaj vidadanĝeroj ili vivas, sed eĉ tie ili interesiĝas pri nia movado, eĉ tie ili zorgas pri estonteco de esperantismo. Skribu ofte al ili vi ne scias, kian ĝojon kaŭzas ĉiu letero veninta el la amata hejmo kaj skribita de amika mano! Memoru ilin, ĉar ili mem vin memoras, kiel atestas la leteroj, kiujn ni de ili ricevas. Jen kelkaj fragmentoj:

... Preparu vin por granda, forta pagando, kiam ĉesos brui la kanonoj. Ne forgesu la junularon, kiu estos bazo de nia progreso. Estu ne nur esperantistoj, sed eĉ pioniroj de nia movado. Rigardu, mi mem disvendis ĉiumonate 60 ekz. de la „Kulturo“, amason da libroj, broŝuroj k. t. p. Ne atentu, ke la perfiduloj de nia movado, subaĉetitaj, penas ruiniĝi nian ideon, kio cetere restos senrezulta, ĉar la radikoj de esperanto estas jam tro fortaj. Niaj renegatoj fosas la kavon por si mem, tion ili konvinkiĝos post kiam ni revenos por daŭrigi la komencitan laboron...

*Jan Mráz*, sekret. de E. K. Smíchov,  
t. t. kaporalo de 28. I. R.

... Mi estas konvinkita, ke Via plano trovos multe da favorantoj kaj ke ĝi baldaŭ efektiviĝos. Spite tio, ke mi estas nuntempe multe okupata, mi promesas al Vi mian helpon, Ĝojatendante, ke ni baldaŭ havos nian propran organon, kiun ni jam delonge bezonis, mi sendas al ĉiu samideano miajn salutojn.

*Miloš Lukáš*, del. UEA. Jičín,  
t. t. E. F. kap., Sarat, Rumanujo.

La aperon de la gazeto ĝoje bonvenos ĉiu vera amiko de bohema esperantista movado. Unueco ekregas ĉie, ĝi estu eĉ en nia movado. Mi kredas, ke ĉiu, kiu zorgas pri la progreso de nia movado kaj pri la bono de nia nacio, tion komprenos kaj submetiĝos al la necesa disciplino kaj unueco...

Leŭtenanto *Aug. Pitlik*, Kraków.

Entreprenon por la eldono de nia komuna esp. gazeto sur bazoj demokrata kaj progresema mi ĉiuforte subtenos morale eĉ mone. Ĉe viaj bezonoj turnu vin ĉiam al mi...

*Mar. Ing. Rud. Novák*, Pola,  
Ĉefing. de la urba elektrejo en Plzeň.

... La aperon de nia gazeto mi ĝoje atendas. Por Via celo Vi certe bezonas monon, iru nur al mia edzino kaj diru kiom Vi bezonas, mi ĉiam subtenos Vian entreprenon...

*Josef Brožík*, I. R. 35,  
Itala batalkampoj.

## DIVERSAĴOJ.

*De la redakcio:* En la enhavo de nia gazeto ni entreprenas ion, kio ĝis nun ne estis kutima en la poresperantaj gazetoj: Ni komencas enpresadi artikolojn, skribitajn

de la bohemiaj politikistoj. Sed opinio, ke ni per tio esprimas partian politikan vidpunkton estus tute erara; per nia gazeto ni ne intencas subteni iu ajn partion, kiu eble celas renverson de la registaroj. Nia politiko estas pure Zamenhofa: ni staras kontraŭ ĉiu ajn nacia subpremo, ni laboras por homamo kaj libereco. En sia malfermita letero al la diplomatio (Esperanto, 5. IV. 1915) skribis Dr. Zamenhof: „Sinjoroj, diplomatoj! Pōst la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de Vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al la civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restadon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super la aliaj gentoj.“ — Ni sentas same, kiel nia kara mortinta Majstro kaj ni estas certaj, ke nian vidpunkton facile komprenos ĉiu vera esperantisto. — Nian hodiaŭan ĉefartikolon skribis por ni so. Gustav Haberman, prezidanto de la socialdemokrata Klubo deputita. Pro ĝia speciala intereso ni rekomendas traduki ĝin nacilingven kaj sendi ĝin al la naciaj gazetoj. Por la sendo de la koncerna ekzemplero ni estos tre dankaj.

*Esperantistoj helpas!* Ke la scio de esperanto alportas utilon eĉ en la kaptiteco, tion pravas jenaj fragmentoj, prenitaĵoj el la leteroj de so. instruisto V. Valenta el Černice (apud Plzeň), kiu troviĝas en la rusa kaptiteco:

1. ... Mi estas tie ĉi kun esp. so. Ĝinz el Krivoklát. Ni estas tute sen mono, sen varma tolaĵo. Ni meditas, ĉu ne estas eble peti la subtenon de la esperantistoj, ĉar el nia hejmo venas nek leteroj, nek mono...
2. Estas Kristnasko. Ĝojon al ni faris „verdaj fratoj“ el Petrograd, kiuj responde al nia letero sendis monon kaj tolaĵojn. Skribas so. Hajdovski. Nun mi petas de li kelkajn informojn. Mi vidas, ke esperanto en fremdlando bone utilas. Mi neniam forgesos, kiel ĝi utilis al mi en la tempo de plej granda mizero inter la homoj, kiujn mi antaŭe neniam vidis. Kaj kiel bele ili skribas... Mi konservas ilian leteron por memoro. —
3. Esperantistoj el Petrograd ĉiam zorgas pri ni. Ni ricevis novan sendaĵon. Ĉiam mi estos fidela esperantisto, ĉar mi vidas, ke esperanto en la mondo tre utilas...
4. Petrogradanoj ne ĉesas zorgi pri ni: Jus nun ni du ricevis de ili 11 rublojn...

*Esperanto en Holandujo.* Dume en la militantaj landoj, kaŭze de la ĉeso de la internaciaj rilatoj, kaj ĉe ni eĉ pro la aliaj limigoj, malrapidigis la vastigo de esperanto, kreskas nia movado en la landoj neŭtralaj. Por ekzemplo servas Holandujo. Tie nun aperas du esp. gazetoj. En la naciaj gazetoj aperis vico da instruaj kursoj, en la Soldaten-courant kun preskaŭ 2500 aliĝintoj. En Hertogenboch aliĝis 663 soldatoj kaj 53 esperantistoj volis ilin instrui. En Haag preskaŭ 8000 soldatoj aliĝis en la kursojn. En 38 publikaj legejoj oni enmetas esp. gazetojn. La Bohemojn povas interesi, ke esperanton propagandas dum siaj koncertoj la geedzoj Klička. En la lastaj monatoj fondiĝis kelkaj societoj kaj aperis holand-esperanta vortaro enhavanta 30.000 vortojn. *H.*

*Preskaŭ 70.000 demandojn* pri internigitoj kaj malaperintoj de diversaj landoj respondis la centra oficejo de U.E.A. en Genevo. Tiu ĉi organizaĵo, konata inter la esperantistoj de la tuta mondo, estas la sola, kiun la milito ne ruinigis. Post la eksplodo de la milito, kiu malsukcesigis la X. esper. kongreson en Parizo, tiu ĉi organizaĵo eluzante la geografian kaj politikan staton de sia lando, subtenis skribajn rilatojn inter tiuj, kiujn la milito kaptis en la malpacigintaj landoj, kaj inter iliaj familioj. Esperantistoj restis fidelaj al siaj principoj eĉ en la tempo de la plej forta malamo! *Lt.*

*Fondajo por esperanto* en sumo da 20.000 markojn estis en Berlino fondita de geedzoj Huberto kaj Heleno Kleinertz. Post la morto de la ambaŭ geedzoj apartenos tiu ĉi kapitalo al Germana Asocio Esperantista, kaj en dudek jarpagoj ĝi estos uzata por propagando de esperanto. Unuavice por amasa vastigo de malkaraj lernolibroj, por subteno de senpaga instruado en kursoj kaj por havigo de libraj kaj monaj premioj al diligentaj lernantoj. So. Kleinertz estas komercisto, nuntempe milita telegrafisto. Per donaco de 10.000 markojn fondis geedzoj Kleinertz alian fondajon por subteni pacmovadon en Germanujo. *Hmd.*

*Nova lingvo*, kiu volas ludi la rolon de la lingvo internacia estas „Romanol“, lingvo verkita de la iama aranĝinto de nia unua kongreso advokato Michaux el Boulogne sur Mer. Laŭ la sciigo de kelkaj gazetoj ĝi estas franca lingvo miksitaj kun la latina. — Nova vana konkurprovo al esperanto!

*Universala frateco.* Bohemaj membroj de internacia asocio de progresema junularo

Čorda fratres kunvenis la 7. II. t. j. en Praha kaj decidis, pro propagandaj kaŭzoj, fariĝi memstara internacia unuigo propagandanta en konsento kun ĉiuj nacioj de la mondo inter Bohemoj tendencojn celantajn pacifismon, fratecon inter ĉiuj homoj, egalrajton de ambaŭ seksoj, natursciencan abstinismon, batalon kontraŭ ĉiuspeca prostituo kaj pornografio. — La sekcio akceptis la nomon Universala frateco kaj intencas starigi delegitojn en ĉiuj pli gravaj bohemiaj urboj. Ĉiun korespondajon adresu al sekretariino Fino. Boža Plodková en Praha VII., Nad Král. Oborou 3.

*Esperantista voĉo* estas la nomo de la hektografa gazeto, kiun en Kraków eldonas so. Leopold Dreher (strato Listopada 37). Jara abono K 3.— La apero de tiu ĉi gazeto pruvas la bezonon de esp. gazeto por Aŭstrio.

*Esperantan muzeon* fondas la esperantistoj en Kladno. Ili petas sendon de diversaj esp. presajoj, aŭ de la presajoj traktantaj pri esperanto. Informojn volonte donos so. Rud. Nový, Kladno 445.

*Parolado pri esperanto kun lumbildoj* estas preparata de so. prof. Pitlík. Tiucele li petas prunton de la bildoj rilatantaj nian movadon. Li ĉion sendifekte redonos. Post sia kompletigo estos la parolado pruntata al niaj propagandistoj. — Adr.: Leutnant Aug. Pitlík, Schtz.-Regim. 18, Przemysl.

*Manko da loko* ne permesis al ni enpresigi en tiu ĉi numero la angulon por la komencantoj. Ĝi aperos en proksima numero.

## KRONIKO.

*Esperantista klubo en Praha* aranĝis la 15. febr. t. j. en kafejo »Union« sian jaran ĝeneralan kunvenon, kiu elektis en la komitaton i. a. jenajn sinjorojn: reg. kons. Jos. Eiselt (prezid.), JUDr. Frant. Kohout (vicprez.) lernejan kons. Ph. Dr. Václav Rosický (bibliot.), Fr. Novák (kasisto), K. Procházka (sekret.). Dum diskuto pri la liberaj proponoj oni proklamis favoran vidpunkton al la peno celanta la unuigon de bohemiaj esperantistoj kaj unuanime estis akceptita jena propono: „La ĝenerala kunveno komprenante, ke por la sukcesa propagando de esperanto kaj por energia venkado de idista propagando en bohemiaj landoj, plue por serioza reprezentado ankaŭ la naciaj institucioj kaj influoplenaj korporacioj bohemiaj same eĉ por konservo de la nacia honoro antaŭ la monda forumo, estas nepre necesa la unueco de ĉiuj bohemiaj esperantistoj, bonvenas la decidon de Boh. Unio Esp. subteni la klopodon celantan la unuigon kaj esprimas la deziron aktive partopreni la rilatan traktadon. Por tiu celo ĝi proponas al la komitato de la Unio, ke ĝi iniciatu la fondon de la prepara komitato konsistanta el la reprezentantoj de ambaŭ partioj, kiu povos

baldaŭ efektiviĝi la unuigo kaj postulas, ke la Esperanta klubo en Praha estu reprezentata en tiu ĉi preparita komitato. Delegito por tiu ĉi komitato estas la klubo sektretio. Al so. lern. kons. Dr. V. Rosický, kiu rezignis je la prezidanta funkcio, por havi la eblon senĝene sin dediĉi al la gvidado de la Unio, oni esprimis varman dankon por lia modela kaj senprofita administrado de la klubo dum lia longjara prezidanteco. — La korespondantojn por la klubo oni adresu al: So. i. r. registara konsilanto Jos. Eiselt, Král. Vinohrady, Slezská ul. 58. Korespondantojn por la Unio akceptas so. i. r. lerneja kons. Dr. V. Rosický, Praha II., Táborská ul. 43.

*Esperantista klubo en Plzeň* aranĝos la 23. mart. t. j. sian XIII. ĝeneralan kunvenon en la rest »Na Mázhauze«, Veleslavínova ul.

*Esperantista fraŭlina rondeto en Praha* aranĝis la 23. febr. en la prelega ĉambro de Ženský klub český tre sukcesintan amuzan vespereton, kiun ĉeestis krom fervoraj kursaninoj de Finoj, Šupichová kaj Dandová ankaŭ la membroj de bohema Asocio kaj Unio kun nia poeto Dr. Schulhof el Pardubice. La programo estis tre interesa kaj por la reciproka konatiĝo de la esperantistoj estas dezirinde, ke similaj amuzaj estu pli oftaj. J. S. Setkal.

*Kursoj de esperanto:* Praha, en Ženský klub kurso por komencantoj (gv. Fino. L. Dandová) kaj konversacia (gv. Fino. J. Šupichová). Plzeň, lab. domo »Peklo«. Kurso finiĝis per la esp. parolado pri »Bohema Svisujo«. 47 partoprenintojn instruis so. J. Pech. Klatovy. Laboristaj turistoj finis sian kurson la 3. marton, kiun partoprenis 32 lernantoj. Gvidis nia propaĝandisto so. J. Vavírka en la soc. domo »U slunce«. Škvrňany ap. Plzeň. Kurso aranĝita de soc. Sokol kun 27 lernantoj en la loka burĝa lernejo kaj gvid. de so. B. Tittl finis 24. febr. Vieno. Unuigo de bohemiaj turistoj aranĝas kurson de esp. alian kurson por Bohemoj gvidas so. Rud. Petr. (Detalaĵoj al ni mankas).

*En Červený Kostelec* kunvenas esperantistoj merede de la 8. en Sokolská tř. 7.

*Wien.* Tre ĝojiga movado estas en tiu ĉi aŭstria metropolo. Jam en la pasinta jaro aranĝis tie ĉi la Aŭstria katolika ligo esp. tri esp. diservojn, kiuj bonege sukcesis. Oni akiris per ili multe da novaj anoj, inter ili son. provincialon de Piaristoj h. s. P. Franciskon Meštan el Krems, a. D., kiu fondis en sia urbo societon »Esperanto-angulo« kaj gvidas tie kursojn. Li ankaŭ gajnis por nia atero la eldonanton de la loka »Kremser Zeitung«, en kiu nun ĉiusemajne aperas esp. rubriko. — La dua fervora adepto de esp. estas estimid. frat. Lybia Hartl, kiu enkondukis esp. en la privatan pedagogion Wien VII, Kenyong 8. — Unua Viena Esp. Societo aranĝas ĉiunmonate kunvenon por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la mondlingvo. La 8. febr. denove pleniĝis la salono de la inĝenieroj kaj arkitektistoj en Wien I, Eschenbachg. tiel, ke ne ĉiuj alvenintoj trovis lokon por si. Oni t'e aranĝis amuzan vesperon esp. Kursoj de esp. nun okazas en: l. r. teknika altlernejo. Instruas lektoro de esp. so. dir. J. Schamanek. — En Pedagogio, Wien I., Hegelg. 12. Instruas so. prof. J. Glück. — En la sama ejo okazas kurso por progresintoj, kiun gvidas so. kolonelo Zwach. — En Pedagogio Wien VII., Kenyong, instruas esp. est. fratinoj Lybia Hartl kaj Charitina Agenberger. — Societoj Fideleco kaj Instruista societo Esperanto aranĝas kursojn en Wien XVIII., Hainzingerstr. — En Neue Wiener Handelsakademie instruas esp. so. prof. Otto Simon. — Kvarhoran kurson por profesoroj, redak-

toroj kaj lingvistoj aranĝas so. lektoro Schamanek en la teknika altlernejo en la jeraj tagoj: 5. III., 12. III., 19. III., kaj 9. IV. de la 6.—7. horo vesp. — En du privataj komercal lernejoj estas esp. instruata. — La 14. apr. aranĝos la Instr. soc. Esperanto amuzajon, dum kiu parolados kun akompano de lum-bildoj esperante so. J. Pech el Plzeň pri belajoj de Bohemujo.

*Oderfurt, Moravio.* La 27. febr. estis tie ĉi fondita Esperanta Klubo. (Kafejo Zentral.)

*Klatovy.* La 24. marton kunvenis tie ĉi esp. turistoj el Plzeň kaj Klatovy. Oni vizitis ĉi tiean kastelon, ke parolos pri ĝa historio. Oni fondos tie ĉi esp. societon.

*Esperantaj rubrikojn* enhavas en Bohemujo la jenaj gazetoj: Malý Ctenář, kaj Rozkvět (Ambau en Praha).

### SCIIGO DE LA ELDONANTOJ:

Ĉar la Laborista presejo en Plzeň, en kiu ni decidigis presi nian gazeton, ĝis nun ne ricevis la necesajn matricojn por la kompostmaŝino, kiujn ni mendis en la Viena fabriko, ne estis al ni eble eldoni »La Progreson« en la tempo difinita de nia I. konferenco. Por eviti pluan prokraston en ĝia aporo, ni provizore uzas la servon de la Popola libropresejo en Praha, kiu kompostas nian gazeton mane. Por forigi la datan diferencan ni decidigis eldoni nun duoblan numeron kaj la marta numero aperos post nelonge. De niaj amikoj ni petas pardonon pro la prokrasto, kiun ni ne kaŭzis.

Esperantista klubo en Plzeň.

### EL LA ADMINISTREJO:

Tiu ĉi numero estas sendata al ĉiu esperantisto, kies adreso al ni estas konata. La vico da adresoj, kiujn ni ĝis nun kolektis, ne povas al ni auŝi, tial ni turnas nin al ĉiu nia leganto kun la peto, ke li bonvole al ni sendi la adresojn de siaj konatuloj, kiuj eble abonos nian gazeton. Nur per la helpo de ĉiuj niaj amikoj povas prosperi nia gazeto, kaj ni ne dubas, ke la prosperon al ĝi deziras ĉiu vera esperantisto. Al ĉiu nia helpanto ni sp. ciale dankos.

### ALVOKO!

*Ni volas klopodi, ke „La Progreso“ reprezentigu kiel riĉenhava, bone kaj rapide informata gazeto. Tial ni turnas nin al ĉiunaciaj pli spertaj esperantistoj, petante ilian kunlaboron. Ĉiu laboru laŭ sia kapablo: la lertuloj per pli longaj traktaĵoj, la aliaj per informo pri la esp. movado en ilia loko. Ĉies helpon ni volonte akceptos kaj ni ĝojos, se ĉirkaŭ nia redakcia tablo ni trovos plej diversan kunlaborantaron.*

*La redakcio.*

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. — Presis: Popola libropresejo J. Skalák & Kio. Praha.